



**SUNO**  
**LA LINGVA INTERNACIA**  
**ORGANO DE LA HISPANA SOCIETO**

**VALENCIO (HISPANUJO)**

Direktoro - Administranto : AUGUSTO JIMENEZ LOIRA  
Corona, 5, 2.<sup>o</sup>, VALENCIA

ĈEFREDAKTORO : VICENTO INGLADA ORS  
Capitanía general de Cataluña—BARCELONA

Tiu-ĉi gazeto estas ankaŭ organo de la  
grúpoj de Murcio kaj Valencio

LA KORESPONDADON, abonojn kaj ĉiujn informojn pri la gazeto,  
oni adresu al direktoro

5, Corona, 5 - VALENCIA (Espanña)

organo de la hispana societo por la pro-

★  
ĉiumonata gazeto,

-pagando de la lingvo internacia



# LA SUNO HISPANA

ORGANO DE LA SOCIEDAD ESPAÑOLA PARA LA PROPAGACIÓN DEL ESPERANTO  
SE PUBLICA MENSUALMENTE

## KOSTO DE LA ABONO

**En Eksterhispanaj landoj:** Unu jaro, tri frankoj, kaj unu numero, **0'30** frankoj, pagataj per mono, per kambio, aŭ per poŝtmarkoj, precize Francaj.

**En Hispanujo:** Unu jaro, tri pesetoj kaj unu numero, **0'30** pesetoj, pagataj per mono, per kambio, aŭ per poŝtmarkoj de korespondado, precize po **5** centimoj.

*Oni akceptas la abonojn nur por almenaŭ unu tuta jaro.*

## KOSTO DE LA ANONCOJ

Por centimetroj kvadrataj

De 6 ĝis 12 — 0'05 ĉiu centimetro.  
» 12 » 24 — 0'045 » »  
» 24 » 48 — 0'04 » »  
» 48 » 96 — 0'035 » »  
» 96 » 192 — 0'03 » »

Tiuj-ĉi kvantoj rilatas al frankoj aŭ pesetoj, laŭ la fremda aŭ hispana loĝejo de la anoncantoj.

*Rabatoj da 5, 10 kaj 20 % en abonoj po tri, ses kaj dekdu anoncoj.*

*La korespondencia, suskripciones,  
y todos los informes relativos al periódico, dirijanse al director*

**Corona, 5, VALENCIA (España)**

Aukaŭ oni povas aboni tiun-ĉi Gazeton, ĉe sinjoro Paul Fruictier, 27 boulevard Arago, Parizo, redakcio de «Lingvo Internacia»

kaj

ĉe sinjoro Manuel Benavente, bibliotekisto de la Hispana Societo por la propagando de Esperanto.

*Sociedad, 14, Murcia.*

## PRECIO DE LA SUSCRIPCION

**En el Extranjero:** Un año, tres francos y un número, **0'30** francos, en moneda, letra, ó sellos precisamente franceses.

**En España:** Un año, tres pesetas y un número, **0'30** pesetas, en moneda, letra ó sellos de correspondencia, precisamente de **5** céntimos.

*No se admiten suscripciones por menos de un año.*

## PRECIO DE LOS ANUNCIOS

Por centímetros cuadrados

De 6 á 12 — 0'05 uno.  
» 12 » 24 — 0'045 »  
» 24 » 48 — 0'04 »  
» 48 » 96 — 0'035 »  
» 96 » 192 — 0'03 »

Estas cantidades se refieren á francos ó pesetas, según que los anunciantes residan en el extranjero ó en España.

*Rebajas de 5, 10 y 20 % en abonos por tres, seis y doce anuncios.*

También se puede hacer la suscripción á este periódico, en casa de Mr. Paul Fruictier, 27, boulevard Arago, París, redacción de «Lingvo Internacia»

y

en casa de D. Manuel Benavente, bibliotecario de la Sociedad Española para la propagación del Esperanto.

*Sociedad, 14, Murcia.*

La dirección de este periódico admite suscripciones á los periódicos *Lingvo Internacia* (véase el anuncio en *Gazetaro Esperantista*) é *Internacia Medicina Revuo*, revista que se publicará en breve y constará de seis cuadernos anuales de 48 páginas, al precio de **7** francos la suscripción anual.



JARO I.  
N.º 3.ª

# LA SUNO HISPANA

Al ĉiuj legantoj de LA SUNO HISPANA ni prezentas plej korajn bondezirojn por la nova jaro.

A todos los lectores de LA SUNO HISPANA presentamos las felicitaciones más afectuosas para el año nuevo.

## Nia kordankeco

Kiam ni publikigis la unuam numeron de LA SUNO HISPANA, premis nin dubo senkompata: ĉu la modesta gazeto ricevos la bonvolon de niaj samideanoj? Tion ĉi ni demandis al ni en plej kruela necerteco.

Hodiaŭ tiu dubo jam malaperis. La gazetaro akceptis nian humilan revuon kun granda simpatio. La Esperantistaro permesis al ni okupi, por la batalado, plej sensignifan lokon en la lastan vicon.

Korajn dankojn, estimataj kolegoj!  
Ni ne forgesos tiun favoran akcepton.

Por montri al nia legantaro kiom aminde traktis nin la samideanoj, ni nur prezentos kelkajn el la plej grandsignifaj atestoj.

D.º Zamenhof en poŝtkarto, kiun ni ne scias danki sufiĉe, diras al ni:

«Mi estas konvinkita ke LA SUNO HISPANA havos grandegan signifon en la historio de nia afero kaj via bela gazeto

## Nuestra gratitud

Cuando publicamos el primer número de LA SUNO HISPANA, duda inhumana nos oprimía. ¿Recibirá la modesta revista el favor de nuestros compañeros? Esto nos preguntábamos en la más cruel incertidumbre.

Hoy esta duda ya ha desaparecido. La prensa ha aceptado nuestra humilde revista con gran simpatía. Los esperantistas nos han permitido ocupar, para la lucha, el lugar más insignificante en la última fila.

¡Muchas gracias, estimados colegas!  
No olvidaremos tan favorable acogida.

Para mostrar á nuestros lectores cuán amablemente nos han tratado los compañeros, presentaremos solamente algunos de los testimonios de más significación.

El Dr. Zamenhof, en una tarjeta postal que no sabemos agradecer bastante, nos dice:

«Estoy convencido de que LA SUNO HISPANA tendrá grandísima significación en la historia de nuestra causa y que su



baldaŭ fariĝos centro de granda moviĝado esperanta en via glora lando kaj en ĉiuj aliaj landoj parolantaj la lingvon de Cervantes!»

Kia belega antaŭdiro! Brave, saĝa kaj eminenta majstro!

Ni lasu nun la parolon al la konita aŭtoro de *Esperanto en dek lecionoj*:

«Mi ne dubas ke vi brave kondukos la bataladon...; nia *pafilo* estas bona, tre bona, ni estas en plena batalo: *ni do pafu!*

.....

»Kaj nun supreniru ĉiam pli alten, bela SUNO HISPANA, kaj lumu por la lando de Cervantes!»

Ĉu oni povas legi pli entuziasmajn vortojn? Atendu, legantoj: atentu ankaŭ la belan esprimon de la saĝa prezidanto de la Grupo Esperantista Pariza:

«Mi ne dubas ke tiu gazeto tre utilos al la disvastigo de nia bela lingvo en via lando.

.....

»Antaŭ du jaroj ĉiuj jeridis nian entreprenon en Francujo kaj nomis ĝin utopio. Nun ne estas plu mokantoj; estas nur *kontraŭuloj*, kaj la energio de iaj kontraŭdirantoj estas vera pruvo de nia nuna forteco.

»Oni ridas je bagatelo; oni nur batalas kontraŭ forta militistaro.

»Jam de kelka tempo ni vidas la skeptikuloj pli malmultiĝi kaj nian anaron plimultiĝi.

»Antaŭ du jaroj *Esperantismo* estis frenezeco aŭ fantazieco; nun ĝi estas *malsano grava*.

»Perfekte! Sed la mikrobo esperantista estas tre vivplena kaj la malsano estas tre transiĝebla. Kaj la malsanuloj ĉiam pli kaj pli fariĝas multenombraj.»

bella revista llegará pronto á ser centro de gran agitación esperantista en ese glorioso país y en todos los demás en que se habla la lengua de Cervantes.»

¡Bellísima predicción! ¡Bravo, sabio y eminente maestro!

Dejemos ahora la palabra al conocido autor de *El Esperanto en diez lecciones*:

«No dudo que usted conducirá la lucha con valentía... Nuestro *fusil* es bueno, muy bueno; estamos en pleno combate: *¡disparemos!*

.....

»Y ahora elévate sin descender nunca, hermoso SUNO HISPANA, y difunde tu luz por el país de Cervantes!»

¿Pueden leerse palabras más entusiasmadas? Esperad, lectores; prestad atención á la expresión bella del sabio presidente del Grupo Esperantista de París:

«No dudo que esa revista será muy útil á la difusión de nuestro hermoso idioma en ese país.

.....

»Hace dos años en Francia todos se refan de nuestra empresa y la llamaban utopía. Hoy ya no existen burlones; solamente hay *contrarios*, y la energía de algunos contradictores es una verdadera prueba de nuestra fuerza actual.

»Las bagatelas mueven á risa: se combate solamente á un ejército fuerte.

»Desde algún tiempo vemos disminuir más y más el número de los escépticos y aumentar el de nuestros adeptos.

»Hace dos años el *Esperantismo* era locura ó fantasía; ahora es ya una *enfermedad grave*.

»¡Perfectamente! Pero el microbio esperantista está lleno de vida y la enfermedad es muy contagiosa. Y el número de los enfermos aumenta cada vez más.»



Post la cito de tiuj elokventaj vortoj ni ne kuraĝas plu paroli; nia mutiĝo nur permesas al ni diri, unuflanke:

Koran, tre koran dankon!

Kaj aliflanke:

Antaŭen, karaj kolegoj, ĉiam antaŭen!

LA REDAKCIO.

Después de citar palabras tan eloquentes, no nos atrevemos á hablar más; nuestro silencio sólo nos permite decir por una parte:

¡Gracias, gracias de todo corazón!

Y por otra:

¡Adelante, queridos compañeros, siempre adelante!

LA REDACCIÓN.

## Bibliografio

La lastan monaton oni sendube difinis por la publikigo de gravaj verkoj esperantaj; ni tion kuraĝas diri, ĉar ĵus aperis kvar libroj rilatantaj la lingvon internacian, tiel interesaj kaj grandsignifaj, ke ni ne povas anonci ilin sciigante nur ilian titolon, koston kaj vendejon, sed ekzamenante mallonge la enhavon de iliaj admirindaj paĝoj.

«*Fundamenta krestomatia de la lingvo Esperanto de L. Zamenhof. Librejo Hachette kaj k.º Parizo.*»

Kiel esprimas la titolo, tiu libro estas plena elmontrado de plej bonaj kaj diversspecaj tekstoj esperantaj, kiuj aperis de la kreo de la lingvo internacia.

La nomo de la aŭtoro ja sufiĉas por rekomendi la korektecon kaj bonegecon de la stilo, tiom pli ke D.º Zamenhof prezentas oficiale la libron kiel imitindan modelon de esperanta verkado.

*Fundamenta krestomatia* alvenas plej ĝustatempe; nun kiam plioftiĝas de tago al tago la aŭtoroj de reformoj—nur *sajnaj* plibonigoj—por la lingvo internacia, kiam Esperanto pli ol iam brilas kaj disvastiĝas, rapidege kaj samtempe, ĉiuj senescepte, bedaŭras la neblon legi kaj posedi la tekstojn de la plej bonaj Esperantistoj, enpresigitajn en broŝuroj kaj

## Bibliografía

Indudablemente el mes último ha sido designado para la publicación de obras esperantistas de importancia; nos atrevemos á decir esto, porque acaban de aparecer cuatro libros relativos á la lengua internacional, tan interesantes y de tan gran significación, que no podemos anunciarlos indicando solamente su título, precio y lugar de venta, sino examinando brevemente el contenido de sus admirables páginas.

«*Crestomatia fundamental de la lengua Esperanto por L. Zamenhof. Librería Hachette y C.ª, París.*»

Como indica el título, este libro es una exposición completa de los mejores y más variados textos esperantistas que han aparecido desde la creación de la lengua internacional.

El nombre del autor basta ciertamente para recomendar lo correcto y excelente del estilo, tanto más que el Dr. Zamenhof presenta oficialmente el libro como modelo, digno de imitarse, de composición esperanta.

La «*Crestomatia fundamental*» llega con la mayor oportunidad; ahora que se hacen más frecuentes de día en día los autores de reformas—mejoras *ficticias* solamente—de la lengua internacional, que el Esperanto brilla más que nunca y se difunde rapidísimamente, y al mismo tiempo, todos sin excepción, lamentan la imposibilidad de leer y poseer los textos



gazetoj tute konsumitaj kaj neniel akireblaj, kaj fine, nun, kiam igas sin senti la bezono montri al mondo libron enhavantan ĉiuspecajn tekstojn esperantajn por pruvi praktike kaj nediskuteble ke la lingvo internacia taŭgas por ĉio, kiel viva lingvo, la apero de la verko de D.<sup>o</sup> Zamenhof devas esti salutata kiel okazintaĵo de plej granda graveco.

Ke la eminenta aŭtoro de Esperanto plene sukcesis en sia entrepreno estas fakto nedisputebla; nur, tralego de *Krestomatío* sufiĉas por tion kredi, por montri ke la lingvo internacia posedas ĉiujn bonajn ecojn, kiujn oni povas postuli de vera idiomu helpa.

*Krestomatío* komenciĝas per *Ekzercaro* de doktoro Zamenhof; tiu teksto ne estas nova; ĉiu konas ĝin plej detale, sed pro tio mem, krom ĝia granda merito, ĉiuj Esperantistoj ĝojos revidi ĝin, rememorante ke tiuj ekzercoj estis la unua lernteksto kiu gradige elmontris al ili ĉiujn regulojn de la lingvo internacia.

Post *Ekzercaro* oni legas kolekton da *legendoj* kaj *fabeloj*; tre bone elektite el la multenombra amaso da similaj tekstoj kiujn oni verkis aŭ tradukis esperante, tiu dua parto estas vere interesa; precipe la traduko de la fabelo Andersen'a titolita *La Virineto de maro* estas belega kaj pruvas ĝis evidento kiel Esperanto alpropigas al si ĉiujn nuancojn de literatura riĉeco, ĉiujn elesprimecajn mirindaĵojn.

Kiam oni finas la legon de la delikata *Virineto de maro* oni envenas en novan fakon nomitan *Anekdotoj*. Tie la spirito amuzas sin en plej ĝoja libereco per la lego de tiuj spritaj kaj mallongaj rakontetoj.

*Anekdotoj* 'n sekvas kolekto da *rakontoj* tre interesa; la unua, nomita *Nokto*, de Enbe, el Odeso, prezentas al ni Kris-

de los mejores Esperantistas, contenidos en revistas y folletos agotados completamente y que de ningún modo pueden adquirirse; y, finalmente, ahora que se siente la necesidad de enseñar al mundo un libro que contenga toda clase de textos en Esperanto para demostrar práctica é indiscutiblemente que la lengua internacional sirve para todo como una lengua viva, la aparición de la obra del Dr. Zamenhof debe ser saludada como un acontecimiento de la mayor importancia.

Y que el eminente autor del Esperanto ha triunfado en su empresa es un hecho indisputable; basta leer una vez la «Crestomatía» para creerlo, para mostrar que la lengua internacional posee todas las buenas cualidades que se pueden exigir á un verdadero idioma auxiliar.

Empieza la «Crestomatía» por el «Ekzercaro» del Dr. Zamenhof. No es nuevo este texto; todos lo conocen hasta el último detalle; pero por esto mismo, aparte de su gran mérito, todos los esperantistas se regocijarán de volverlo á ver, recordando que estos ejercicios han sido el primer texto de enseñanza que les ha presentado gradualmente todas las reglas de la lengua internacional.

Después del «Ekzercaro» se lee una colección de *legendas* y *fábulas*; muy bien elegida entre la multitud de textos semejantes que se han escrito ó traducido en Esperanto, esta segunda parte es verdaderamente interesante; principalmente la traducción de la fábula de Andersen titulada «La mujercita del mar»; es bellísima y prueba hasta la evidencia cómo el Esperanto se apropia todos los matices de riqueza literaria, todas las maravillas de expresión.

Cuando se termina la lectura de la delicada «Mujercita del mar» se llega á una nueva sección llamada «Anécdotas». Allí el espíritu se solaza en la libertad más alegre con la lectura de aquellos relatos breves é ingeniosos.

Sigue á las «Anécdotas» una colección de *narraciones* muy interesante; la primera, llamada «Noche», de Enbe, de



toforon Kolumbon en sia mara ekspedicio por la malkovro de la *nova mondo*. La afero pritraktita estas iom malnova, sed la rakonto estas tiel delikate kaj lerte verkita, ke oni legas ĝin kun sama plezuro kian oni ricevas legante aferon tute novan aŭ originalan. La ceteraj rakontoj estas indaj kolegoj de *Nokto* kaj ankaŭ meritas ĉiujn laŭdojn.

La kvina parto de *Krestomatío* estas titolita: *El vivo kaj scienco*. Kolekto da artikoloj vere originalaj kaj de granda diverseco. Por montri al la legantaro kiom ekstereordinaraj estas tiuj tekstoj sufiĉas diri ke inter ili oni trovas artikolon titolitan *Maso por kungluado de marmoro, gipso, porcelano, k. t. p.*, alian pritraktantan *La fino de la mondo* kaj en lastaj paĝoj de tiu fako estas la *Fiugra kalendaro, originale verkita de F. Grohn*, kelkaj komercaj leteroj el sinjoro de Beaufront, artikolo medicina titolita *Kronika katara konjunktivito* kaj *La Kurioza sunhorloĝo en Dijon*.

Sekvas nova kolekto nomita *Artikoloj pri Esperanto*. Tiu ĉi fako estas tre rimarkinda kaj kiel ĝi multe rilatas la demandon de lingvo internacia, ni ne povas kontraŭstari la tenton transkribi la titolojn de la ĵus cititaj artikoloj. Jen estas ili:

«*El la unua libro de la lingvo Esperanto*»; «*Plena Gramatiko de Esperanto*»; «*Al la historio de la provoj de lingvoj tutmondaj de Leibnitz ĝis la nuna tempo*. Publika parolado, havita en la Nurenberga klubo de instruistoj la 11 de novembro 1884 de L. Einstein» kaj «*Esenco kaj estonteco de la ideo de lingvo internacia*. Raporto legita (en formo iom ŝanĝita kaj mallongigita) de Sro. L. de Beaufront en la kongreso de *L'Association Française pour l'Avancement des Sciences* (Parizo, 1900)».

La lasta sepa fako de «*Fundamenta krestomatío*» estas titolita *Poezio*: ĝi enhavas 68 versaĵojn, el kiuj la 17 unuaj estas verkitaj de D.<sup>o</sup> Zamenhof mem kaj la ceteraj de la plej bonaj aŭtoroj, S.<sup>oj</sup>

Odesa, nos presenta á Cristóbal Colón en su expedición marítima para el descubrimiento del «nuevo mundo». El asunto de que se trata es algo antiguo, pero la narración está escrita con tanta habilidad y delicadeza, que se lee con el mismo gusto obtenido al leer un asunto completamente nuevo ú original. Las restantes narraciones son dignas compañeras de «Noche» y también merecen toda clase de elogios.

La quinta parte de «*Crestomatía*» se titula «*De la vida y de la ciencia*», colección de artículos verdaderamente originales y de gran variedad. Para mostrar á los lectores cuán extraordinarios son estos textos, basta decir que entre ellos se encuentra un artículo titulado «*Composición para pegar el mármol, yeso, porcelana, etc.*», otro que trata del «*fin del mundo*», y en las últimas páginas de esta sección está el «*Calendario digital*», original de J. Grohn, algunas cartas comerciales del señor de Beaufront, un artículo de medicina titulado «*Conjuntivitis cataral crónica*» y «*El curioso reloj de sol de Dijon*».

Sigue una nueva colección llamada «*Artículos sobre el Esperanto*». Esta colección es muy notable, y como interesa mucho á la cuestión de la lengua internacional, no podemos resistir á la tentación de reproducir los títulos de los artículos que acaban de citarse. Helos aquí:

«*Del primer libro de la lengua Esperanto*»; «*Gramática completa del Esperanto*»; «*A la historia de los ensayos de lenguas universales desde Leibnitz hasta nuestros días*. Conferencia pública celebrada en el Club de profesores de Nurenberg el 11 de Noviembre de 1884, por L. Einstein» y «*Esencia y porvenir de la idea de lengua internacional*. Trabajo leído (en forma algo cambiada y abreviada) por el Sr. L. de Beaufront en el Congreso de *L'Association Française pour l'Avancement des Sciences* (París, 1900)».

La última y séptima sección de la «*Crestomatía fundamental*» se titula «*Poesía*». Contiene 58 poesías, las 17 primeras escritas por el mismo Dr. Zamenhof y las demás por los mejores autores seño-



Belmont, Devjatnin, Dombrowski, Goldberg, Grabowski, Haller, Kofman, k. c. Fine, en la lastaj paĝoj oni trovas unuan akton de *Hanleto* (traduko de D.<sup>o</sup> Zamenhof) kaj unuan kanton de *Iliado* (traduko de A. Kofman).

Tiuj ĉi mallongaj konsideroj sufiĉos por montri al la Esperantistoj la nekompareblan valoron de la citita verko. Rekomendojn ĝi ne bezonas, ĉar ne ekzistas por libro subskribita de la genia elpensinto de Esperanto.

Tial ni antaŭvidas ke ĉiuj amantoj de la lingvo internacia rapidos akiri verkon kiu meritas sen ia ŝanĉeliĝo la unuam kaj honoram lokon en ĉiuj esperantaj bibliotekoj ĉu privataj, ĉu publikaj.

«*Komercaj leteroj de P. Berthelot, kaj Ch. Lambert Profesoro de la Universitato de Dijon. Librejo de Hachette kaj K.<sup>o</sup> Kosto: 0.<sup>fr</sup> 50.*»

Kiel oni legas en «Antaŭparolo» de tiu bonega verketo, ĝia celo estas presenti al la Komercestoj esprimilon tute pretan por faciligi iliajn traktojn negocajn uzante la lingvon Esperanton.

Kvankam la aŭtoroj tre modeste konfesas ke la verketo *ne pretendas tuj atingi kaj eĉ ne celis perfektecon kaj ĝi proponiĝas kiel provaĵo ne kiel definitivaĵo*, ĝia enhavo estas tre interesa kaj ni ne dubas ke ĝi alportos grandan utilon al ĉiuj kiuj interesiĝas je komercaj aferoj.

La broŝuro citita enhavas 34 leterojn, kiuj rilatas la kutimajn aferojn tradkitaĵn de la komercistoj, multajn diverspecajn anoncojn kaj en la lastaj paĝoj estas vortareto esperanta de komercaj vortoj kun apudaj tradukoj franca, germana kaj angla.

Resume, la verketo estas tre interesa kaj utila, ne nur por komercistoj, sed ankaŭ por ĉiuj Esperantistoj. Pri ĝia stila korekteco ni nur bezonas diri ke «Ko-

res Belmont, Devjatnin, Dombrowski, Goldberg, Grabowski, Haller, Kofman, etcétera. Finalmente, en las últimas páginas se encuentra el primer acto de «Hamlet» (traducción del Dr. Zamenhof) y el primer canto de la «Iliada» (traducción de A. Kofman).

Estas breves consideraciones bastarán para mostrar á los esperantistas el incomparable valor de la obra citada. No necesita recomendaciones, porque no las hay para un libro firmado por el inventor genial del Esperanto.

Por esto prevenimos que todos los amantes de la lengua internacional se apresurarán á adquirir una obra que, sin ninguna vacilación, merece el primer lugar honorífico en todas las bibliotecas esperantistas, sean públicas ó privadas.

«*Cartas comerciales de P. Berthelot, y Ch. Lambert profesor de la Universidad de Dijon. Librería de Hachette y C.<sup>a</sup> Precio: 0.<sup>fr</sup> 50 francos.*»

Como se lee en el prólogo de esta excelente obrita, su objeto es presentar á los comerciantes un medio de expresión ya dispuesto para facilitar los tratos de sus negocios usando la lengua Esperanto.

Aunque los autores confiesan muy modestamente que la obrita *no pretende ni ha tenido por objeto alcanzar la inmediata perfección y se propone como ensayo y no como cosa definitiva*, su contenido es muy importante y no dudamos que proporcionará gran utilidad á todos los que se interesan por los asuntos comerciales.

El folleto citado contiene 34 cartas que se refieren á los asuntos que ordinariamente son objeto de los tratos comerciales, muchos y variados anuncios, y en las últimas páginas hay un Vocabulario Esperanto de palabras comerciales, con traducción inmediata en francés, alemán é inglés.

En resumen: la obra es muy interesante y útil no solamente para los comerciantes, sino también para todos los esperantistas. Y de la corrección de su es-



mercaĵ leteroj» apartenas al «Kolekto aprobita de D.<sup>o</sup> Zamenhof.»

Ni sincere rekomendas ĝin kaj deziras ke la unua eldono estu tuj konsumita.

Pro manko de spaĉo ni prokrastas por la proksima numero raporton pri la du gravaj verkoj:

«*Histoire de la langue universelle par L. Conturat, docteur en lettres et L. Leau, docteur en sciences. Librairie Hachette et C.<sup>ie</sup> Prix 10 fr.*

«*Esperantu Sintakso laŭ verkoj de D.<sup>o</sup> Zamenhof kaj aliaj aŭtoroj, en esperanto verkita de D.<sup>o</sup> Paŭlo Fruictier, Redaktoro de Lingvo Internacia. Kosto: 1 fr. 50.*

V. I. O.

tilo basta que digamos que «Cartas comerciales» pertenece á la «Colección aprobada por el Dr. Zamenhof».

La rekomendamos sinceramente y deseamos que la primera edición se agote en seguida.

Por falta de espacio dejamos para el próximo número el dar cuenta de las dos importantes obras:

«*Historia de la lengua universal, por L. Conturat, Doctor en Letras, y L. Leau, doctor en Ciencias. Librería Hachette y C.<sup>a</sup> Precio: 10 francos.*»

«*Esperanta Sintakso con arreglo á las obras del Dr. Zamenhof y otros autores, escrita en esperanto por el Dr. P. Fruictier, redactor de LINGVO INTERNACIA. Precio: 1,50 fr.*

V. I. O.

## Sciigoj

Nia samideano la ingeniero sinjoro Felikso Monterde, perdis sian karan kaj junan edzinon. Rapida malsano kondukis sin al tombo. Ni akompanas nian bonan amikon kaj iliajn ceterojn parencojn en tiu ĉi malĝojeco.

Aŭkaŭ ni bedaŭras kun lia familio la morto de nia kara amiko kaj samideano la luitenanto de ŝipo el milita maristaro sinjoro Johano Ponte Peña.



*Francojo.*—La ĉiu semajnaj kunvenoj de la Grupo Esperantista Pariza jam malfermiĝis kaj ankaŭ komenciĝis la tridek kursoj esperantaj aranĝitaj de tiu aktiva kaj senlaciĝa Grupo.

En la suda antaŭurbo de Parizo oni fondis novan Grupon kies nomo estas: *Grupo Esperantista de la kantono de Leaux.* *Presidento*, D.<sup>o</sup> Boisson; *sekretario-asisto*, S.<sup>o</sup> Maillard.

Grupo ankaŭ fondiĝis en *Nantes.* *Presidento*, D.<sup>o</sup> Saquet; *sekretario*, D.<sup>o</sup> Bossis.

## Noticias

El ingeniero D. Félix Monterde, esperantista, ha perdido á su querida y joven esposa. Una rápida enfermedad la ha llevado al sepulcro. Acompañamos á nuestro buen amigo y á sus demás parientes en su pena.

Asimismo sentimos, con su familia, la muerte de nuestro querido amigo el teniente de navío de la armada D. Juan Ponte y Peña, también esperantista.



*Francia.*—Se han abierto ya las reuniones semanales del Grupo Esperantista de París, y han comenzado también los treinta cursos de Esperanto preparados por este activo é infatigable Grupo.

En el distrito meridional de París se ha fundado un Grupo cuyo nombre es *Grupo Esperantista del cantón de Leaux.* *Presidente*, Dr. Boisson; *secretario tesorero*, Sra. Maillard.

Un Grupo se ha fundado también en *Nantes.* *Presidente*, Dr. Saquet; *secretario*, Dr. Bossis.



Grupoj formiĝas en *Troyes, Narbonne, Bourges, Perpignan, Périgueux. Chateau-Thierry* k. c.

*Grupo de Montpellier* renovigis sian registaron. Estis elektitaj: *Honora Prezidanto*, S.<sup>o</sup> Simeon Courthial; *prezidanto*, S.<sup>o</sup> Bel; *viceprezidanto*, S.<sup>o</sup> Lucien Costeséque; *sekretario-kasisto*, S.<sup>o</sup> Paul Tabusse.

En *Annency* oni reelektis por la Grupo Esperantiste la registaron de la lasta jaro.

En *Dijon*, la nova loka komitato elektita de la Grupo estas: *honora prezidanto*, S.<sup>o</sup> Méray; *prezidanto*, S.<sup>o</sup> Lambert; *viceprezidantoj*, S.<sup>o</sup> Lallement kaj S.<sup>ino</sup> Fauvart-Bastoul; *ĝenerala sekretario*, S.<sup>o</sup> Jullien.

Ĉiuj francaj Grupoj vidigas grandan aktivecon kaj komeneis la kursojn esperantajn de tiu ĉi jaro.



*Belujo.*—En la *Brusela Klubo Poliglota* komenciĝis la kursoj esperantaj de la 12.<sup>a</sup> de Oktobro.

En *Loveno* ankaŭ malfermiĝis la esperantaj kursoj post parolado publika de sinjoro Mathys kaj Van Dieren.

Niaj Antverpenaj samideanoj efike propagandas nian lingvon internacian. La 7.<sup>an</sup> de Novembro havis lokon tre sukcesa kunveno ĉe «Taverne Royal» por festi la malfermiĝon de la kursoj esperantaj. Tie, sinjoro L. Blanjean, el Bruselo, faris tre elokventan paroladon pri la evolucio de Esperanto.

En la unua kunveno de la «Esperantista Studenta Grupo» de la Ganta universitato (la 3.<sup>an</sup> de Novembro) oni elektis la jenan komitaton por la jaro akademia 1903-1904: *prezidanto*, S.<sup>o</sup> M. Seynaeve; *sekretario*, S.<sup>o</sup> E. Cauterman; *kasisto*, S.<sup>o</sup> G. Van den Abeela.



*Anglujo.*—La unua kunveno de *Esperanto Society en Brixton* rezultis tre sukcesa.

Grupos están en formación en *Troyes, Narbonne, Bourges, Perpignan, Périgueux, Chateau-Thierry*, etc.

El *Grupo de Montpellier* ha renovado su junta directiva. Fueron elegidos: *presidente honorario*, Sr. Simeón Courthial; *presidente*, Sr. Bel; *vicepresidente*, Sr. Lucien Costeséque; *secretario-tesorero*, señor Paul Tabusse.

En *Annency* fué reelegida para el Grupo Esperantista la junta directiva del último año.

En *Dijon* la nueva junta local elegida por el Grupo es: *presidente honorario*, Sr. Méray; *presidente*, Sr. Lambert; *vicepresidentes*, Sr. Lallement y Sra. Fauvart-Bastoul; *secretario general*, Sr. Jullien.

Todos los Grupos franceses muestran gran actividad, y han empezado los cursos de Esperanto de este año.



*Bélgica.*—En el *Club Poliglota de Bruselas* han empezado los cursos esperantistas desde el 12 de Octubre.

En *Louvain* también se han abierto los cursos de Esperanto después de una conferencia pública dada por los señores Mathys y Van Dieren.

Nuestros compañeros de Amperes propagan eficazmente nuestra lengua internacional. El 7 de Noviembre tuvo lugar una brillante reunión en «Taverne Royal» para celebrar la apertura de los cursos esperantistas. Allí el Sr. L. Blanjean, de Bruselas, pronunció un elocuente discurso sobre la evolución del Esperanto.

En la primera reunión del «Grupo Esperantista Estudiantil» de la Universidad de Gante (3 de Noviembre) se eligió la siguiente junta para el año académico de 1903-1904: *Presidente*, Sr. M. Leynaeve; *secretario*, Sr. E. Cauterman; *tesorero*, Sr. G. Van den Abele.



*Inglaterra.*—La primera reunión de la *Esperanto Society en Brixton* resultó un gran éxito.



Post bela parolado pri Esperanto, la ĉiusemana kurso komenciĝis.

Por ĉiuj informoj dezireblaj oni sin turnu al sinj. E. W. Eagle (21, Kellett Road, Brixton) honora rekrutario.

Sinjoro Treleaven faris bonegan paroladon ĉe Atheneum de Plymouth; ankaŭ paroladoj publikaj fariĝis en Londono de sinjoroj Mudie kaj O'Connor kaj en Edimburgo de S.<sup>o</sup> Latour.

Fondiĝas Grupoj en *Sonthampton* kaj *Dundee*; oni kreis lokan esperantistan grupon en *Forest Gate* (Londona kvartalo). Ni ŝuldas ĝin al sinj. Motteau: ĝia sekretario estas S.<sup>o</sup> J. Beale, 74 Claremont Road.



*Svisujo*.—La *Geneva* Grupo estas definitive organizita sub prezido de D.<sup>o</sup> Mellet.

Gazeto *Sviza Espero* aperos sesonjare presata per ordinara tipografio, de la jaro 1904.<sup>a</sup>

De unua de Januaro, *Juna Esperantisto* fariĝos revuo internacia por ĉiujlandaj junuloj: ĝi eliros sesonjare kaj estos presata nur en Esperanto; ĝi enhavos artikolojn pri moviĝado esperantista kaj ĉiuspecajn sciigojn, interesantajn la junularon.

La abono kostas 2 frankojn aŭ 5 frankojn por esti protektabonanto.

Ni rekomendas tiun ĉi gazeton al gejunularo kaj aŭkaŭ al geinfanoj.



*Bulgarujo*.—En cirkulero, kiuj ni ricevis antaŭ kelkaj tagoj, la esperanta klubo «Stelo» de Plovdivo anoncas ke la 8.<sup>an</sup> de Novembro je la deka horo matene komenceiĝos la unua publika kurso por la helpa lingvo internacia Esperanto.

Ni deziras al kurso plej bonan sukceson kaj precipe multe da lernantoj



Laŭ reportas *L'Espérantiste* sinjoro Elisée Reclus decidis eldoni du *kartojn*

Después de un hermoso discurso sobre el Esperanto, el curso semanal ha comenzado.

Para todos los informes que se deseen, dirigirse al Sr. E. W. Eagle (21, Kellett Road, Brixton), secretario honorario.

El Sr. Trebaven pronunció un excelente discurso en el Ateneo de Plymouth. También se han dado conferencias públicas en Londres por los Sres. Mudie y O'Connor y en Edimburgo por el señor Latour.

Se están fundando Grupos en *Southampton* y *Dundee*; se ha creado un Grupo esperantista local en *Forest Gate* (distrito de Londres). Lo debemos al señor Motteau. Su secretario es el señor J. Beale, 74, Claremont Road.



*Suiza*.—El Grupo de *Ginebra* se ha organizado definitivamente bajo la presidencia del Dr. Mellet.

La revista *Sviza Espero* aparecerá cada dos meses desde el año 1904, impresa en tipografía ordinaria.

Desde primero de Enero, *Juna Esperantisto* se convertirá en revista internacional para los jóvenes de todos los países. Se imprimirá solamente en Esperanto; contendrá artículos respecto al movimiento esperantista y toda clase de noticias interesantes á la juventud.

El abono cuesta 2 francos ó 5 francos para ser abonado protector.

Recomendamos este periódico á los jóvenes y niños de ambos sexos.



*Bulgaria*.—En una circular que hemos recibido hace algunos días, el Club Esperantista «Stelo», de Plovdiv, anuncia que el día 8 de Noviembre, á las diez de la mañana, empezará el primer curso público de la lengua internacional auxiliar Esperanto.

Deseamos á este curso el éxito más lisonjero y principalmente muchos alumnos.



Según refiere *L'Espérantiste*, monsieur Elisée Reclus ha decidido publicar



*geografiajn* montrantaj la *Disvastecon de la lingvo Esperanto*. 1.<sup>o</sup> ĝeneralan karton de la mondo kun skalo de 100.000.000.<sup>ono</sup>; 2.<sup>o</sup> karton specialan de Eŭropo kun skalo de 20.000.000.<sup>ono</sup>.

Tiuj kartoj kaj broŝuro kiu akompanos ilin sciigos pri ĉiuj interesaj konajoj esperantaj; sidejo de la Societoj Esperantistaj, lokoj en kiuj oni eldonas esperantajn gazetojn, loĝejo de Esperantistoj kies adreso estas konita, k. c.

Ni ne penos montri la gravecon de tiu propagandilo; nur tio, kion ni ĵus diris, kaj la nomo de la aŭtoro sufiĉas por konvinkiĝi pri la granda valoro de la verko citita.

Estas dezirinde ke ĉiuj Grupoj Esperantistaj kaj samideanoj helpu S.<sup>o</sup> E. Réclus per la sendo de ĉiuj dokumentoj statistikaj rilatantaj la aferon, por rapidigi la aperon de la kartoj kaj Esperantistoj skribus senprokraste al Sinj. E. Reclus, (35, Ernest Allard, Bruxelles) dirante kiom da ekzempleroj ili deziras akiri por ili si mem aŭ por propaganda celo.

Tio sendube permesus fari preparan antaŭkalkulon pri la nombro da ekzempleroj kiujn oni eldonos kaj certe faciligos la efektiviĝon de la ideo nomita.



Ni surprize kaj plezurege legis tri artikolojn tre bone verkitaj pri Esperanto en tri intersekvaj numeroj de *El Noticiero Turolense* gazeto kiu eliras en la ĉefurbo de la provinco de Teruel-o. Ni korege dankas kaj gratulas pri tio la redakcion kaj la aŭtoron, kiu kaŝiĝas sub la pseudonimo *Thugga-Von-Retsuff*.



*Valencio*.—En la *Piaj Skoloj* okazis la 30 de novembro lasta solena kunveno

dos *mapas geográficos* indicadores de la *extensión en que se ha propagado el Esperanto*; primero, un mapa general del mundo en escala 1 : 100.000.000; segundo, un mapa especial de Europa en escala de 1 : 20.000.000.

Estos mapas y un folleto que les acompañará, harán saber todos los conocimientos interesantes del Esperanto, punto de residencia de las sociedades Esperantistas, puntos en que se publican revistas esperantistas, domicilio de los esperantistas cuya dirección se conozca, etc.

No nos esforzaremos en mostrar la importancia de este medio de propaganda; solamente lo que acabamos de decir y el nombre del autor bastan para convencerse del gran valor de la citada obra.

Es de desear que todos los Grupos Esperantistas y compañeros ayuden al Sr. E. Reclus con el envío de todos los documentos estadísticos que se refieran al asunto para apresurar la aparición de los mapas, y al mismo tiempo sería muy de agradecer que todos los Grupos y Esperantistas escribiesen sin dilación al Sr. Reclus (35, Ernest Allard, Bruselas), diciendo el número de ejemplares que desearan adquirir para sí ó para fines de propaganda.

Esto sin duda permitiría hacer un cálculo preparatorio del número de ejemplares que ha de editarse, y ciertamente facilitaría la realización de la mencionada idea.



Con sorpresa y muchísimo gusto hemos leído tres artículos muy bien escritos sobre Esperanto en tres números consecutivos de *El Noticiero Turolense*, periódico que ve la luz en la capital de la provincia de Teruel. Cordialmente damos las gracias, y felicitamos por ello á la redacción y al autor, que se oculta bajo el pseudónimo *Thugga-Von-Retsuff*.



*Valencia*.—En las *Escuelas Pías* tuvo lugar el día 30 de Noviembre último una



por disdono de lernpremioj aljuĝitaj al la lernantoj rekompensitaj pro iliaj studoj dum la lasta jaro.

En tiu kunveno, antaŭ klera kaj multenombra publiko, infano Enriko Valor parolis laŭte kaj belmaniere la jenajn esperantajn vortojn:

«ESPERANTA SALUTO

»Gesinjoroj:

»Parolante la unuan fojon en tiel sole-  
»lena okazo kaj antaŭ tiel eminenta ĉes-  
»tantaro la belsonan internacian lingvon  
»Esperanton, mi sentas grandegon gojon  
»kiu plenigas mian koron, ne sole ĉar  
»tiamaniere la klera publiko, kiu aŭdas  
»miajn vortojn, povos konvinkiĝi ke Es-  
»peranto estas belega, riĉa, kaj facila lin-  
»gvo, sed ankaŭ, ĉar ĝi ricevas en tiu gra-  
»va kunveno la merititan honoron aperi  
»apud nia nekomparebla lingvo nacia.

»La unua fojo, en kiu vi, auskultas  
»publike tiun eksteordinaran lingvon es-  
»tu do, por sciigi ke, koncerne la interpa-  
»rolon, falis jam la altegaj muroj kiu ĝis  
»nun dispartigis la diversajn popolojn  
»de la mondo, ne esceptante eĉ la ne-  
»transpaŝeblajn ninajn muregojn.

»Estas Esperanto kiu malfermis gran-  
»dajn breĉojn en la nomitaj muroj kaj  
»ĉiu nacio per la dura penado de ĝia  
»disvastigo daŭrigos ĝis fino la interesan  
»faligan laboradon.

»Dume, el tiu loĝejo mem ni povas  
»jam adresi al tutmonda saluton inter-  
»nacion, certaj ke ĝi resonos en ĉiuj lan-  
»doj de la tero.

»Diru al mi, gesinjoroj: ĉu tio ne po-  
»vos tre efike helpi la universalan frat-  
»igon de ĉiuj popoloj? Ni, katolikoj, apar-  
»tenantaj al la multenombra kristana fa-  
»milio, devas speciale laboradi por la  
»efektivigo de tiu nobla entrepreno. Sub  
»la protekto de la Papo, nia patro, ni es-  
»tas ja duoble fratoj. Fariĝu, do, Espe-

soleme reunión para distribuir los premios correspondientes á los alumnos recompensados por sus estudios durante el pasado año.

En esta reunión, ante un público culto y numeroso, el niño Enrique Valor pronunció en voz alta y de un modo admirable las siguientes palabras en esperanto:

«SALUDO ESPERANTISTA

»Señores:

»Al hablar por primera vez en tan  
»soleme ocasión y ante concurrencia tan  
»distinguida la armoniosa lengua inter-  
»nacional Esperanto, siento una alegría  
»grandísima que llena mi corazón, no so-  
»lamente porque de este modo el ilus-  
»trado público que oye mis palabras po-  
»drá convencerse de que el Esperanto es  
»una lengua bellísima, rica y fácil, sino  
»también porque en esta importante re-  
»unión recibe el merecido honor de apa-  
»recer al lado de nuestra incomparable  
»lengua nacional.

»La primera vez que ustedes escuchan  
»esta lengua extraordinaria, sea para  
»saber que, por lo que concierne á la  
»comunicación verbal, han caído ya los  
»altísimos muros que hasta ahora han se-  
»parado á los diversos pueblos del mun-  
»do, sin exceptuar ni las infranqueables  
»murallas chinas.

»El Esperanto es el que ha abierto  
»grandes brechas en los muros mencio-  
»nados, y cada nación, con la dura labor  
»de su difusión, continuará hasta la ter-  
»minación el interesante trabajo demo-  
»ledor.

»Entretanto, desde esta misma man-  
»sión podemos dirigir ya á todo el mun-  
»do un saludo internacional, seguros de  
»que resonará en todos los países de la  
»tierra.

»Decidme, señores: ¿no contribuirá  
»esto eficazmente á la fraternidad uni-  
»versal de todos los pueblos? Nosotros,  
»católicos, que pertenecemos á la nume-  
»rosa familia cristiana, debemos trabajar  
»especialmente para la realización de esta  
»noble empresa. Bajo la protección del  
»Papa, nuestro padre, somos por cierto



»ranto lingvo de la fratoj, de tiu univer-  
 »sala familio kaj ni tiemaniere helpos la  
 »deziron de Jesuo-Kristo: «*Estu nur unu*  
 »*paŝtisto kaj unu sola ŝafaro.*»

»Mi diris.»

Tiam sonis bruega aplaŭdaro! Ĉiuj  
 ĉeestantoj gratulis kore la paroladinton,  
 kiu ĝuigis al ĝi tiel neatenditan kaj agra-  
 blan surprizon.

Ni raportas tiun novaĵon por konigi  
 al niaj legantoj la originalan manieron  
 propagandi Esperantan uzitan de niaj sa-  
 mideanoj valenciaj kaj samtempe por  
 gratuli la R. Pastrojn de la Piaj Skoloj  
 pro la granda sukceso kiun ricevis la so-  
 lena interkunveno de ili aranĝita en la  
 celoj jam diritaj.

»hermanos doblemente. Llegue á ser,  
 »pues, el Esperanto la lengua de los her-  
 »manos, de esta familia universal y de  
 »este modo ayudaremos á cumplir el  
 »deseo de Jesucristo: «Haya un solo pas-  
 tor y un solo rebaño.»

»He dicho.»

¡Sonó entonces una salva de aplausos  
 atronadora! Todos los concurrentes feli-  
 citaron cordialmente al orador que les  
 había hecho disfrutar de tan inesperada  
 y agradable sorpresa.

Damos cuenta de esta noticia para  
 que conozcan nuestros lectores el medio  
 original empleado por nuestros compa-  
 ñeros valencianos para propagar el Es-  
 peranto, y al mismo tiempo para felicitar  
 á los RR. PP. de las Escuelas Pías por el  
 gran éxito alcanzado en la reunión dis-  
 puesta por ellos para los fines ya men-  
 cionados.

## La leono kaj la azeno

Azeno kiu renkontis leonon diris al li ridante kaj mokŝajne: «Dio vin gardu,  
 amiko!» La leono indigniĝis kaj respondis: «Mizerulo! Mi ne volas makuli miajn  
 dentojn per via sango, kvankam vi tre bone meritas ke mi vin dispecigu!»

*La malsagulojn kaj malklerulojn oni devas pardoni.*

ESOPO.

★

## La kamelo kaj Jupitero

Kamelo ĉagreniĝinte ĉar li vidis ke la bovoviroj havas kornojn por sia defendo  
 kaj li mem ian defendilon ne posedas, plendis al Jupitero dirante ke estas tre  
 strange ke la bovoviroj havas kornojn, dentojn la porkoj, pikiletojn la erinacoj  
 kaj ke la ceteraj bestoj estas same provizitaj krom la kamelo, kiu ion ne havas  
 por sin defendi malgraŭ sia vastkorpeco.

Tion aŭdinte Jupitero malgajiĝis kaj diris al li: «Ĉar vi ne estas sufiĉe kontenta  
 je tio kion difinis al vi la Naturo, mi forprenas viajn orelojn». Kaj efektive li ilin  
 fortranĉis.

*Ne avidu ni la neposedaton,  
 ĉar oni povas perdi la havaton.*

ESOPO.



# BIBLIOTECA ESPERANTISTA EN SIGNOS BRAILLE PARA CIEGOS

## 40 TOMOS

LOS PRECIOS SE INDICAN FRANCO DE PORTE

### A. *Obras impresas.*

1. Manual Francés. . . . .	francos	5
2. Manual Inglés. . . . .	»	5
3. Manual Alemán. . . . .	»	5
3 bis. Parte Esperanta del Manual, aparte. . . . .	»	2'50
4. Ejercicio del Dr. Zamenhof. . . . .	»	2'50

### B. *Obras manuscritas.*

5. Vocabulario Esperanto-Francés. . . . .	»	7
6. Vocabulario Francés-Esperanto (2 tomos). . . . .	»	15
Los dos juntos. . . . .	»	20
7. Hamleto, trad. de Zamenhof (5 tomos). . . . .	»	25
El primer acto solamente. . . . .	»	5
8. Historia de los ciegos, de Guilbeau. . . . .	»	2'50
9. Esperantaj Prozaĵoj (15 tomos).		
I Fabeloj & Rakontoj. . . . .	»	3
II Pafarko, Infera muzikanto, Ordeno, Alpa rozo, Piemonta valo, Poezio. . . . .	»	3'50
III Malserioza & senpripensa, Bileto de loterio, Mobilizado. . . . .	»	3'50
IV La plej maljuna filino, Du kapoj & unu ideo. . . . .	»	3'50
V Ne venas el agentejo, Kristnaska bulko. . . . .	»	3
VI Kvin tagoj en Finnlando. . . . .	»	2
VII Decideco, Fantomoj. . . . .	»	3'50
VIII Inter tomboj, Historio de kelkaj sunradioj. . . . .	»	3'50
IX Norde de la polusa rondo. . . . .	»	3'50
X Bonan nokton, kara Margareto. . . . .	»	2'50
XI La kverko. . . . .	»	2'50
XII En printempo de la juneco. . . . .	»	6'00
XIII Kozu-Kurpeĉ & Bajan-Slu. . . . .	»	6'50
XIV ĉu la lingvo internacia devas esti perfekta ĉu Esperanto taŭgas por la literaturo. . . . .	»	4
XV Zamenhof: Letero al Borovko. . . . .	»	2
10. Diversaĵoj (4 tomos).		
I La ekonomia negreto, La sonorilo. . . . .	»	4
II Ne atendita donaco, Hermengarde. . . . .	»	4
III Patrino Sanĝta-Agato. . . . .	»	3
IV La leprulo de urbo Aosto. . . . .	»	6
11. Byron: Kain (3 tomos). . . . .	»	14
12. Aŝik-Kerib. . . . .	»	5
13. Kvar-Tagoj. . . . .	»	5
14. Attala aŭ Princeps. . . . .	»	2'50
15. Leibnitz: Monadologio, trad. de E. Boirac. . . . .	»	6'50

Diriĝanse los pedidos al secretario de la revista *Lingvo Internacia*, 27, boulevard Arago, París.

*Nota.* Algunas de las obras manuscritas no podrán ser servidas hasta unos días después de recibido el pedido.



## VARIAS OBRAS

### DE LA COLECCION APROBADA POR EL DOCTOR ZAMENHOF

Autor de la lengua Internacional Esperanto

**Librería HACHETTE et C<sup>ie</sup>, 79, boulevard Saint-Germain, PARIS, y sus corresponsales**

*Grammaire et exercices de la langue internationale Esperanto*, par L. DE BEAUFONT.

—Prix: 1 fr. 50.

*Corrigé de «Grammaire et Exercices»*, par L. DE BEAUFONT.—Prix: 0 fr. 75.

*Dictionnaire Esperanto Français*, par L. DE BEAUFONT.—Prix: 1 fr. 50.

*Vocabulaire Français-Esperanto*, par Th. CART, MERCKENS et P. BERTHELOT.—

Prix: 2 fr. 50.

*Commentaire sur la Grammaire Esperanto*, par L. DE BEAUFONT.—Prix: 2 fr.

*L' Esperanto en 10 leçons*, par Th. CART, et M. PAGNIER.—Prix: 0 fr. 75.

*Corrigé de «L' Esperanto en 10 leçons»*, par Th. CART et PROCUREUR.—Prix: 0 fr. 50.

*Premières leçons d' Esperanto*, par Th. CART.—Prix: 0 fr. 30.

*Primeras lecciones de Esperanto*, por Th. CART, traducción de A. L. Villanueva;  
0 fr. 30.

*Texte synthétique des règles, préfixes, suffixes et expressions de l' Esperanto*, par  
L. DE BEAUFONT.—Prix: 0 fr. 50.

### DE LA COLECCIÓN ESPERANTA DE L. I.

LINGVO INTERNACIA, 27, BOULEVARD ARAGO, PARIS

N.º 2. *Esperanta Frazlibro de la Turisto*, 400 utilaj frazoj en Esperanto kun tradukoj angla, franca, germana, hispana, itala, kaj adresaro de diverslandaj Grupoj Esperantistaj. . . . . 0 fr. 50

N.º 3. *Esperanta Sintakso laŭ verkoj de S<sup>ro</sup> Doktoro ZAMENHOF kaj aliaj en Esperanto*, de P. Fruictier, ĉefredaktoro de «Lingvo Internacia».. . . . 1 fr. 50

### EN LA SECRETARÍA DEL "GROUPE ESPERANTISTE DE PARIS"

10, place de la Bourse (en el Touring-Club de France), Paris (2<sup>o</sup>)

*Universala Vortaro* de la lingvo internacia Esperanto, par le D<sup>r</sup> L. ZAMENHOF.—

Prix: 1 fr. 10 (franco).

Esta obra es un vocabulario de raíces, menos completo que el *Dictionnaire Esperanto-Français*, pero con la traducción en francés, inglés, alemán, ruso y polaco.

*Vocabulaire Français-Esperanto des mots spéciaux à la philatélie, avec modèles de lettres*, par René LEMAIRE.—Prix: 0 fr. 40.

### EL BIBLIOTECARIO DEL GRUPO ESPERANTISTA DE MURCIA

Sociedad, 14,

se encarga de hacer la suscripción á cualquiera revista de Esperanto de las que se publican en la actualidad, como igualmente de proporcionar cualquiera de las obras de Esperanto, de las que forman la colección aprobada por el Dr. Zamenhof, autor del idioma internacional.—Vale «Esperanto» por Menu de Menil, se envía franco de porte por una peseta; si se desea certificado, mándese veinticinco céntimos más.—Gramática del Sr. Villanueva, 1'50 ptas. para fuera de Murcia, franco de portes y certificado.—Bonito sello de propaganda de Esperanto con estrella pentagonal, para adherirlo á tarjetas, cartas, etc., á peseta el ciento.—No se sirve ningún encargo que no venga acompañado de su importe en letra del Giro Mutuo, carta-orden, ó sellos de diez y quince céntimos, certificando la carta en este último caso.

### EN LAS ESCUELAS PÍAS DE VALENCIA

Elementos para el estudio del Esperanto, 1903.—Rvdo. P. ANTONIO GUINART